
INSTRU-CIRKULERO 2016/02 (decembro 2016)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

Karaj Gekolegoj,

Jen nia lasta ĉi-jara informilo, kiu enhavas rerigardon al eventoj en la dua duonjaro en 2016 kaj interesaĵojn pri instruado, instrumaterialoj el Germanio kaj eksterlando.

I. KUNVENOJ

En nia jarĉefkunveno en majo dum la 93-a GEK en München okazis renovigo de nia estraro. Ni elkore dankas al Karin Klose pro la kelkjara subteno kaj kunlaboro kaj salutas inter ni la novulon Martin Ptasinski.

Okazis decido pri la sekvajara jarĉefkunveno: ni renkontiĝos laŭtradicie dum GEK. La 94-a Kongreso de GEA okazos inter 2-5.06.2017 en Freiburg. Detaloj ĉe <https://www.esperanto.de/de/dek2017>

AGEI estis reprezentita dum kelkaj gravaj someraj eventoj: Zsófia Kóródy partoprenis en la 101-a UK en Nitra, Slovakio kaj ankaŭ en la 49-a ILEI-konferenco en Nyíregyháza, Hungario, kie ŝi kaj Peggy Ley agadis en la komitatkunsidoj. Raportoj pri la konferenco: <http://www.ilei.info/>. Protokolo de la komitatkunsido: <https://goo.gl/6TQspM>. Spektu kvin-minutan filmon el bildoj faritaj dum la 49-a konferenco de ILEI: <https://www.youtube.com/watch?v=ocVpu9RmzZkk>

Interesaĵo estas, ke ekde 2017 ILEI nomas siajn grandkunvenojn ne konferencoj sed kongresoj, do inter 15-22 julio 2017 ĝuste antaŭ la 102a Universala Kongreso en urbo Busan en la suda parto de Koreio okazos la 50-a ILEI-kongreso. Aliĝilon, informilon vi trovos en IPR aŭ per la retpaĝo de ILEI <http://www.ilei.info/>, aŭ en Facebook: <https://www.facebook.com/groups/158807324552503/?fref=ts>

II. MEMBROJ

Nia membraro iom malplimultiĝis en la lastaj jaroj pro kelkaj malaliĝoj pro maljuniĝo kaj pro la bedaŭrinda forpaso de kelkaj niaj membroj. Ni kondolencas.

Ni elkore dankas al ĉiuj niaj membroj por la daŭrigo de la membreco ankaŭ en 2017 kaj alvokas al invito de novaj membroj. Bv. rekomendi nian asocion al interesiĝantoj pri Esperanto-instruado, al gekolegoj instruantaj la plej diversajn fakojn, al instruemuloj, ktp. La membrokotizo restos la sama (25 EUR) ankaŭ en 2017. Familianoj ricevas rabaton. La membrokotizo enhavas ankaŭ abonon de la gazeto Internacia Pedagogia Revuo.

Aliĝilon, informojn oni trovas ĉe <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=78065795>

Jen alvoko ankaŭ de la prezidanto de ILEI, Mireille Grosjean:

Vi volas fortan kaj grandan ILEI? Membriĝu! Vi volas efikan ILEI? Membriĝu!

Vi volas, ke ILEI vidiĝu ekster la movado per digna partopreno en diversaj landaj, internaciaj aŭ tutmondaj establoj kiel UNESKO? Membriĝu!

En decembro multaj homoj pripensas pri donacoj al parencoj. Jen luma ideo: donacu membrecon al ILEI!

III. KURSOJ

Ni memorigas vin pri la graveco anonci novajn kursojn al la oficiala arigejo por tiuj informoj en la retejo edukado.net. Buntigu la liston kaj la mapon kaj vidigu vian lernejan aŭ eksterlernejan Esperanto-kurson! Ĉio raportita aperas en tabela formo kaj en formo de interaktiva mapo. La tabeligo estas ordigebla, filtrebla por doni maksimuman flekseblon en la trovado de specifaj informoj. Iru al edukado.net kaj elektu "Kursejo". Tie eblas vidi la listigon kaj mem enskribi siajn kursojn aŭ anonci sin kursgvidanto. La retejo disponigas forumon por interklasaj kaj interinstruistaj kontaktoj.

Ni gratulas al Edukado.net, kiu ĵus fariĝis 15-jara!

Ni vidas tie tre malmultajn kursojn el Germanio. Bedaŭrinde la lerneja Esperanto-instruado tre malmultas, en universitatoj ankaŭ nur en kelkaj lokoj funkcias kursoj, sed ofte venas ĝojigaj informoj pri sukcesaj informagadoj, prelegoj, kursoj ĉe VHS (Popolaltlernejoj). Gratulojn al ĉiuj iniciatemaj gekolegoj, sindonemaj disvastigantoj, semantoj de nia internacia lingvo Esperanto!

IV. TREJNADO

A) Germana Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg, ICH) ankaŭ en la dua duono de 2016 ofertis plurajn klerigeblojn al perfektigemuloj, instruemuloj.

La **74-a studsesio** (10-12 junio) traktis ĉefe gramatikon, lingvistikon kaj ankaŭ preparis studemulojn por trapasi la lingvoekzamenojn de GEI. Ni gratulas al ĉiuj sukcesintoj pro la bona rezulto!

En Herzberg am Harz okazis la **11-a TORPEDO**, samtempe la **75-a studsesio** inter 30.09-03.10.2016.

Jen la ĉefaj temoj kaj la internacie konataj fakuloj, kiuj prelegis aŭ gvidis laborrondon:

1. Modernaj interretaj komunikaĵoj: Planado, produktado, publikigado (Eva Fitzelova, Johannes Mueller)
La speciala seminario celis diskuti eblajn formatojn de interretaj komunikaĵoj kaj volis doni konsilojn. Okazis diskutado pri la ebloj kaj rimedoj interkonsentante pri praktika projekto.
Fine nova kanalo (ekz. ĉe Youtube, Soundcloud aŭ iu propra) kun la unua enhavo estis kreita.
2. Internaciaj, ekstermovadaj projektoj, subvenciebloj (Sara Spano, Francesco Maurelli)
Kiel akiri monon por Esperanto-agado, por internaciaj eventoj?
Fakprelegoj, gravaj informoj pri la novaj eŭropaj Erasmus+ projektoj, pri Volontula Servo, junulara agado kaj aktivula maturigo, trejnado. Prezentadoj, diskutado, praktika lernado
3. Novaj vojoj por lernado kaj efika instruado (Zsófia Kóródy, Peter Zilvar)
Kiujn programojn, lernhelpilojn ni uzu por klubkunvenoj, kion ni rekomendu al niaj lernantoj kaj kiel preparu sin instruistoj? Informado, varbado por kapti la atenton de lernejoj, instruistoj, oferti Esperanton por lernejoj. Nova interreta instrukapabliga sistemo estas ellaborata kaj nun parte prezentota. Kunlaboro inter Esperanto-Centroj kaj aliaj organizaĵoj, projekto PUNTO.

La **76-a studsesio** okazis inter 8-11.12.2016 kun la tradicia Zamenhof-festo kaj 40-jara jubileo de EGS.

B) Trejnsesioj en 2017 en Herzberg am Harz:

24-26.02: 77-a GEA-Studsiesio: Esperanto kaj medicino kun 8-hora oficiala kurso de Unua Helpe far Frank Lappe. Komuna esplorado de gazetoj, fakvortaroj, libroj rilate al medicino, ktp.
13-15.04: 78-a GEA-studsiesio, multe pri Zamenhof, lia familio, 100-a mortodatreveno, politiko, ktp.
29.09-03.10: 79-a GEA-studsiesio: metodiko, aktivula trejnado, TORPEDO-12 kaj Erasmus+ projekto
08-10.12: 80-a GEA-studsiesio, tradicia kristnaska kaj Zamenhof-festo

C) Magistraj studoj en la UAM, Poznan pri etnolingvistiko kun interlingvistika modulo

La du-jaraj surlokaj studoj (en la Lingvistika Instituto, Fakultato de Moderna Filologio) estas ofertata la unuan fojon por gestudentoj el diversaj landoj. Ili entenas studobjektojn pri:

Lingvistiko, kulturo, antropologio / Internacia kaj interkultura komunikado / Planlingvoj kaj esperantologio / Daŭrigo de la lingvoj angla kaj esperanto, komenco de la pola.

La studoj okazos en esperanto kaj la angla, finiĝos per diplomlaboraĵo kaj fina ekzameno. Ili validas sume 120 ECTS (poentojn). Postuloj: baza (bakalaŭrea) universitata diplomo, meza scio de esperanto kaj la angla (B1 nivelo). Studkotizo (por landoj ekster Eŭropa Unio): 2500 EUR / studjaro.

Kandidatoj por 2017-19 bv. anonci sian deziron ĉe ikoutny@amu.edu.pl, fina limdato: 15.08.2017.

V. PROJEKTOJ

1. Germana Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) kunlaboras en internacia **Erasmus+** projekto kun polaj kaj slovakaj partneroj. La celo estas lingve prepari, metodike trejni novajn movadajn gvidantojn kaj instrukapablajn aktivulojn, kiuj trapasos KER-ekzamenon kaj poste en sia ĉirkaŭaĵo iniciatos Esperanto-kursojn, gvidos Esperanto-klubojn aŭ kunlaborante kun siaj iamaj partneroj organizos eventojn, renkontiĝojn, engaĝas sin en aliaj lokaj agadoj por disvastigi Esperanton.

La unua partnera renkontiĝo kaj trejnsesio okazis en Pollando fine de septembro 2016, parte paralele kun la tiama interlingvistika sesio ĉe UAM kaj Arkones, ke la trejnotoj povu sperti krom siaj lecionoj ankaŭ prelegojn ĉe UAM kaj spertiĝi pri kulturaj eventoj de Arkones. La dua trejnsesio okazos dum TORPEDO (Pedagogiaj Tagoj) en Herzberg am Harz en oktobro 2017 kaj la lasta kunveno estos dum SES en Slovakio en 2018.

2. **Somera projektsemajno „Sekreta lingvo Esperanto“** en svisa mezlernejo, distriktlernejo Wildegg, Kantono Argovio. Nova filmo en la kanalo SvisRaporto de Didi Weidmann

<https://www.youtube.com/watch?v=en6XMyUVgoU>

VI. INSTRUHELPILOJ

A) **Nova didaktika helpilo – kartludo „Pekseso Esperanto“.** Temas la konata memorludo por minimume du ludantoj. Ĉiu el la 12 partoj (en apartaj plastaj tekoj, kun zipo) konsistas el 48 ludkartoj, kiuj kreas duopojn. Oni povas uzi la ludon kaj por lerneja instruado kaj por klubaj kursoj, ktp. Ĝi estis prezentita dum la Tago de Lernado en Nitro. Pri la 1-a parto informas la UEA-Libroservo: <http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9314>. La tutan lernpakajon de Stano Marček ni havas en la Esperanto-Centro en Herzberg kun multaj aliaj pedagogiaj-metodikaj verkoj, fakliteraturo, didaktikaj helpiloj. Se iu bezonas detalojn, klarigojn, ŝatus rigardi la ludkartojn, ni volonte montros, disponigos ilin.

B) La **telefona aplikaĵo “Esperanto per rekta metodo”** nun estas preta kaj elŝutebla en la Google-apobutiko. Ĝi estas taŭga por Android-poŝtelefonoj kaj ankaŭ por Android-tabledoj. Sur tabled-ekranoj la bildoj kaj butonoj aŭtomate pligrandiĝas. Detala informo pri la kurso estas en la retpaĝo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando: <http://www.iei.nl/ieieo77.htm>. Por elŝuti kaj instali: iru per via poŝtelefono al la Google-apo-butiko (Google Play) kaj trovu ĝin per la serĉvorto Esperanto aŭ Esperantokurso aŭ per <http://www.iei.nl/apo.htm>. Por elŝuti kaj instali la volumon 2: iru per via poŝtelefono al la Google-apobutiko (Google Play) kaj trovu ĝin per la serĉvorto Esperantoplus aŭ per <http://www.iei.nl/apoplus.htm>. Piet Buijnsters, programisto, Estrarano de IEI, Hago, Nederlando.

C) **Mazi en Gondolando** en YouTube ĉe:

<https://www.youtube.com/watch?v=mWbyXVSiCw&list=PL00F795A844E2824F>.

D) La reta versio de **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV)**, unu el la plej famaj E-verkoj de la lastaj jardekoj: <http://vortaro.net/prie>, <http://vortaro.net/>

E) La teamo de **lernu.net** ĝojas anonci la plenan relanĉon de la paĝaro. Ĝi enhavas novan interesan kurson de Esperanto kun centoj da ekzercoj, ilustraĵoj kaj granda serĉebla biblioteko. La retejo estas plene modernigita kaj funkcias kun novaj retumiloj kaj retaj teknologioj, kiuj ne ekzistis kiam la antaŭa versio de la paĝaro estis lanĉita.

La plena 26-leciana kurso de la nova paĝaro estas bazita je rakonto de konata verkisto Anna Löwenstein, kun ekzercoj de edukisto Birke Dockhorn. La kurso havas abundajn ekzercojn, ilustraĵojn, kaj sonojn, kaj sekvas la gvidliniojn de KER (Komuna Eŭropa Referenckadro) pri lingvolernado. La nova paĝaro ankaŭ enhavas detalan gramatikon de Esperanto kaj referitajn foruman sistemon, vortarojn, kaj tradukilon.

F) **Kurso laŭ la zagreba metodo** lernebla interage en multaj lingvoj: <http://learn.esperanto.com>

Kiam Internacia Kultura Servo en Zagrebo en 1979 laŭ la iniciato de Zlatko Tišljar lanĉis stencilitajn materialojn por siaj lernantoj, bazitaj je 500 morfemoj de la parola Esperanto, oni apenaŭ pensis ke tiuj materialoj akiros 9 eldonojn en la kroata lingvo kaj tridekon da paperaj eldonoj tra la mondo, famiĝinte kiel Zagreba Metodo de la Esperanto-instruado. Jen preskaŭ 40 jarojn post tiu evento, nova kunlaboranto, la germana programisto Georg Jaehnig el Berlino kolektis sian internacian teamon kaj kreis la retan platformon. Ĉe la unopaj lecionoj la lernantoj povas vidi kaj aŭskulti en bona prononco la tekston, povas trovi ankaŭ la novajn vortojn, klarigojn pri la rilata gramatiko kaj solvi kelkajn interagajn ekzercojn.

Al la lecionoj aldoniĝas kelkaj resummaterialoj ekz. la korelativa tabelo, listo de propozicioj, afiksoj kaj kelkaj laŭtemaj vortlistoj. En la vortostoko de la materialo eblas serĉi laŭ la lingvoj. La programo estas libere uzebla kaj komputile kaj en modernaj aplikaĵoj, kiel saĝtelefonoj. Krome, esperantisto el Usono, Enrique Elemeberg kreis jam antaŭ jaroj paĝaron en kiu troviĝas ĉiuj materialoj de la Zagreba Metodo por la lingvoj angla kaj hispana: <http://esperantofre.com/zagreb/zmkanto.htm> kaj ĉiuj aldoniĝoj (kantoj, La sentimulo, Esperanto ne estas nur lingvo, la bildstrio ktp.). Tiuj du retejoj kompletigas sin reciproke kaj nun eblas lerni interaktive laŭ la ZM per ĉiuj materialoj kaj ekzercoj kreitaj en Zagrebo.

G) **Programo por infanoj el Nederlando:** <http://edukado.net/novajhoj?id=668>

Edukado.net kunlaboris kun nederlanda entrepreno kiu pretis enkonduki Esperanto-version inter siajn lingvokursojn, funkciantaj en modernaj teknikaĵoj. La kursoj celas etinfanojn, ekde 2a jaraĝo ĝis la 7a.

H) **Duolingo** publikigis Esperanto-kurson por hispanlingvanoj fine de oktobro. Intertempe jam miloj aliĝis: <https://www.duolingo.com/course/eo/es>

I) **Vortlernado ludante: "Ba-Ba-Dum"**

Lernante el iu ajn lernolibro estas bezono je ampleksigo de vortprovizo, pli kaj pli stabila uzo de novaj vortoj. Tion povas helpi la nova komputila lernprogramo <https://babadum.com/play/?lang=24&game=1>. En la supra maldekstra angulo eblas elekti el inter kvin ekzercotipoj. Bonan lernadon, amuzadon!

Dankon al la pretigantoj de la Esperanto-versio: Soraya Alvarez, Lucas Nahuel Cerante, Klára Ertl, Suso Moinhos, Alejandro Escobedo Muñoz, Dóra Zsuzsanna Szilva, Szabolcs Szilva kaj Przemysław Wierzbowski + Natalia Żebrowska (voĉo).

J) **"Esperanto - einfach, kompakt und übersichtlich"** de Heike Pahlow, Lingolia, aperis ĵus antaŭ GEK en München kaj estis jam aĉetebla tie: <https://www.lingolia.com/de/buecher/esperanto>. Das Buch erklärt die wichtigsten Wendungen, Wortschatzthemen und Grammatikregeln kurz und unkompliziert, ohne jedoch wichtige Details auszulassen. Im Buchhandel sowie bei Online-Buchhändlern erhältlich:

ISBN: 978-3-96008-386-3, Umfang: 144 Seiten, DIN A5, Engelsdorfer Verlag, Leipzig, Preis: 12,00 €
La libro estis prezentata ankaŭ en Expolingua en Berlin ĉe la informbude de Lingolia en novembro.

K) **Vortar-kalendaro 2017 de Lingolia:** <https://www.lingolia.com/en/news/view/calendar-2017>

La bele ilustrita kalendaro estas libere deŝutebla, printebla en pluraj lingvoj (angla, franca, hispana, itala, rusa lingvoj kaj Esperanto). Estas ankaŭ versio kun ĉiuj sep lingvoj. Bela kaj utila novjara donaco!

VII. LIBROJ, GAZETOJ

1. De 1905 la Lingva Komitato kaj de 1948 la Akademio de Esperanto aldonis vortojn al la Fundamento, rekomendis, aprobis kaj konsilis pri lingva ĝusteco de Esperanto. Konsultverko kun laŭeble ĉiuj decidoj de la lingvaj institucioj ĝis nun ne ekzistas. Eĉ se ĝi estas ankoraŭ nekompleta, la **Akademia Dokumentaro** jam nun estas la plej ampleksa kolekto de oficialaj informoj kaj sciigoj, ofte nur malfacile akireblaj. Ĝi suplementas la aliajn volumojn de la Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto: Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto (BK), Aprilo 2016

- BK I: Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro. 3-a eld. Aprilo 2015 (2 Mb)
- BK II: Vortaro Oficiala (Universala Vortaro). 5-a eld. Aprilo 2015 (2,7 Mb)
- BK III: Zamenhofa Verkaro (aperonta)
- BK IV: Akademia Dokumentaro. 1-a eld. Aprilo 2016 (3,2 Mb)
- BK V: Akademia Nomaro (aperonta)
- BK VI: Zamenhof, Lingvaj Respondoj (nova ampleksigita eld., aperonta)
- BK VII: Kabe, Vortaro de Esperanto (1910). 3-a reeld. Marto 2016 (2 Mb)

La volumoj estas formatitaj kiel libroj en la formato pdf (kune ĉ. 1400 p. en formato A4) kaj senkoste elŝuteblaj de <http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro> aŭ tra

<http://esperanto-akademio.wikispaces.com/Berlina+Komentario+pri+la+Fundamento+de+Esperanto>

Helpo je kompletigo per ankoraŭ mankantaj dokumentoj estas bonvena. Kun salutoj: Bernhard Pabst

2. **Juna Amiko**

Surpapera varianto de la revuo kostas A-lande €18; B-lande €13. Ekde 3 ekz. ĉe la sama adreso: A-lande €15; B-landoj €12. Laŭ la decido de la komitatkunsido en Nyíregyháza la reta varianto de Juna amiko kostas A-lande €11; B-lande €7. Abonu por vi mem aŭ subtenu instruadon en alia lando per via abono!
Peranto: zsofia.korody@esperanto.de

3. **Lerniloj, vortaroj de Stano Marček:** Esperantica directo de Stano Marček, 2016. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por latinlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj, tradukita de samideano Bernhard Schwaiger el Erfurt. Prezo: 7.50 EUR.

Jam aperis ankaŭ la bulgara versio. Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=9287>

4. **Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo** de la Aŭstria Nacia Biblioteko havas novan retejon: Kolekto por Planlingvoj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/>
Esperantomuzeo: <http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/>

Pli mallongaj tekstoj, pli da bildoj kaj konciza strukturo zorgu, ke vi facile kaj rapide ricevu deziritajn informojn, kiujn vi bezonas por viaj laboroj en la biblioteko aŭ por via vizito en la Esperantomuzeo.

Ĉi-kune mallonga superrigardo pri la plej gravaj ŝanĝoj:

- La retejo estas plibonigita, por ke vi povu klare legi ĝin sur diversaj iloj kiel (poŝ)komputiloj, tabulkomputiloj kaj saĝtelefonoj.

- Scienca blogo: <http://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/> regule informas pri interesaj temoj rilate al Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko.
- Sur la hejpaĝo vi baldaŭ povos vidi interalie novaĵojn kiel novajn dokumentojn (ekzemple antaŭ- kaj postlasaĵojn en la Esperantomuzeo).

- Pro la nova menuo vi atingas pli facile la diĝitajn dokumentojn:

Libroj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/>

Periodaĵoj: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/periodaĵoj/>

Universalaj Kongresoj de Esperanto (1905-1939):

<http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/universalaj-kongresoj-de-esperanto/>

Unua mondmilito: <http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/unua-mondmilito-1914-1918/>

Ni kore invitas vin viziti nin, ĝuu la foliumadon! Korajn salutojn kaj bondezirojn: Bernhard Tuidier

VIII. La Jaro de la Lernanto (JdL, 2017) - celoj, strategioj, kunlaboro

La Strategia Plano de UEA akceptita en 2013 antaŭvidis tri nomitajn jarojn, kiujn la Asocio festu. En la 101a UK en Nitra, Slovakio estis inaŭgurita la Jaro de la Lernanto kaj ĝi venos al fino en la UK en Seulo aŭ la 50a Kongreso de ILEI. Alvoko de Stefan MacGill (vicprezidanto de UEA) kaj Mireille Grosjean (prezidanto de ILEI):

1. Jen kelkaj proponoj por la ŝlosilaj **celoj**:

- Esplori la demandon, kiel loki pli centre en la eduka procezo la bezonojn kaj dezirojn de la lernanto.
- Daŭrigi kaj fortigi strategiojn, kiel evoluigi la eblojn de perreta lernado.
- Proponi al retaj kursfinintoj la E-vivon por kuraĝigi ilin ekuzi la lingvon kaj eniri la E-komunumon.
- Levi en la movado konscion pri la graveco bonkvalite kaj moderne prezenti kaj instrui la lingvon.
- Konvinki la movadon investi pli adekvate en la trejnado de instruistoj kaj mentoroj por retlernantoj.

2. Strategioj

UEA kaj ILEI kune laboras por realigi la projekton de la Jaro. Signifa agado pri precipe la faka parto de la programo okazos ĉe ILEI. La Ligo nomumis etan komisionon por gvidi la laborojn (alfabete):

Ivan Colling (estranano de ILEI, Brazilo), Mirejo Grosjean (Svislando), Zsófia Kóródy (Germanio), Stefan MacGill (reprezentanto de UEA, el Hungario), Elena Nadikova (estranano de ILEI, Rusio), Nepo Nguyen (Vjetnamio) kaj Germain Pirlot (Belgio). Inter la fruaj taskoj de tiu komisiono estos verki kaj konsenti pri baza dokumento kiu formale difinas la celojn kaj agadojn de la jaro.

3. Proponataj eroj por la **programo** de la Jaro:

- Okazigi tutmonde serion da renkontiĝoj, kiuj gamas de unuopaj sesioj ĝis plenaj kolokvoj aŭ seminarioj por esplori la temojn de la Jaro.
- Starigi meĥanismojn por adekvate arigi la rezultojn de tiuj sesioj cele al la kreo de jarfina resuma raporto, kune kun rekomendoj kaj planoj por utila pluiro.
- Konsenti pri la pretigo de retejo por la komunikado pri la Jaro kaj por kolekti rezultojn.
- Aperigi en revuo *Esperanto* kaj *Internacia Pedagogia Revuo* regule artikolojn pri la eventoj intaj kaj ontaj kaj pri la diskutataj temoj.
- Pretigi kaj dissendi regule gazetarajn komunikojn pri la Jaro en Esperanto kaj tiom da naciaj lingvoj, kiom eblaj, kiuj celas neesperantistan publikon.
- Starigo de pliaj gvidiloj pri edukrilataj temoj.

4. **Kion faru** lokaj grupoj, landaj kaj fakaj asocioj? La eblecoj estas multaj. Elektu el inter ili:

- Anoncu vin al la komisiono, tiel ke ĝi kompilu reton da landaj kaj lokaj aktivuloj.
- Verku kaj sendu ekstercelajn gazetarajn komunikojn de UEA/ILEI, laŭbezone traduku ilin kaj laŭeble aldonu iun lokan informon kaj sendu ilin al ĵurnaloj kaj radio-stacioj.
- -Evoluigu rilatojn kun ĵurnalistoj por altigi la verŝajnon de akcepto de komunikoj.
- Okazigu en Esperanto urban aŭ landan eventon pri la temaro – kun prezentaĵoj, forumoj ks.
- Kunlaboru kun edukaj instancoj okazigi forumojn kaj debatojn pri nuntempaj edukaj tendencoj, en kiuj Eo iel vidigu sin, eĉ se nur malrekte.
- Kontribuu al la internacia arigo de referaĵoj kaj rezultoj el la Jaro.

- Provu krei nacilingvaj materialojn kun valoro al edukistoj kaj lernantoj enlande
- Proponu kunlaboron kun Duolingo (aŭ similaj retejoj) pri la starigo de pliaj kursoj por eklerni Esperanton el diversaj lingvoj

IX. PODKASTO

La podkasta teamo de <movada vid-punkto> pretigis imponan serion da son-intervjuoj kun movadaj aktivuloj kadre de la 101a Kongreso en Nitra, Slovakio. Ĉiuj elsendoj de la UK estas aŭskulteblaj en la retejo de <movada-vid.punkto>:

- *MvP001-Preparoj por UK 101* (registrita en januaro 2016). Gastoj: Peter Baláž, Ján Vajs; 45 min.
<https://movada-vid.punkto.info/2016/01/16/mvp001-preparoj-por-uk101/>
- *MvP003- Parolado pri UEA 2016* Gastoj: Mark Fettes, Martin Schäffer; 50 min. En la PDF aperas foto de tiuj intervjuoj farita dum la postkongresa estrarkunsido.
<https://movada-vid.punkto.info/2016/07/25/mvp003-parolado-pri-uea-2016/>
- *MvP004-Esperanto instruado* <https://movada-vid.punkto.info/2016/07/25/mvp004-esperanto-instruado/>
Gastoj: Mireille Grosjean, Katalin Kováts; 1 horo 10 min
- *MvP005-Faka agado* <https://movada-vid.punkto.info/2016/07/27/mvp005-faka-agado/>
Gasto: José Antonio Vergara; 1 horo 32 min
- *MvP006-Lingva justeco* <https://movada-vid.punkto.info/2016/07/28/mvp006-lingva-justeco/>
Gastoj: Javier Alcalde, Bengt-Arne Wickström; 1 horo 46 min
- *MvP007-UK 102 en Seulo* <https://movada-vid.punkto.info/2016/07/28/mvp007-uk102-en-seulo/>
Gastoj: So Jinsu, Ho Song; 57 min
- *MvP008-Esperanta kulturo* <https://movada-vid.punkto.info/2016/07/31/mvp008-esperanta-kulturo/>
Gastoj: Anna Löwenstein, Chuck Smith; 1 horo 33 min
- *MvP009-Resumo pri UK 101* <https://movada-vid.punkto.info/2016/08/04/mvp009-resumo-pri-uk101/>
Gasto: Alois Eder; 1 horo 57 min

Krome ni ankaŭ regule registras podkaston pri neesperantaj temoj: <https://kern.punkto.info/>

Kontaktinformoj por Movada-vid.punkto:

Reteja adreso <https://movada-vid.punkto.info>, retpoŝto: kontakto@movada-vid.punkto.info

Raportis: Johannes Mueller, Julia Noe kaj Eva Fitzelová.

X. KD VARBILO

Post la disko *Esperanto elektronike*, kiun E@I publikigis [senpage rete](#) omaĝe al sia dekjariĝo, venas nun plia senpaga elektronika eldonaĵo. En 2008 E@I publikigis kunlabore kun la urbo Bjalistoko KD-n kun simpla nomo *Esperanto*, kiu prezentas Esperanton al la ĝenerala publiko. La disko estis kreita dulingve: en la pola kaj en Esperanto. Ĝi estis eldonita en rekorda kvanto 400 mil ekzempleroj kaj disdonita senpage kun *Gazeta Wyborcza*. Oni nun povas vidi ĝian enhavon tute senpage en la reto!

La ideo de la disko estis prezenti Esperanton per diversaj manieroj, montri la buntecon de la lingvo kaj ties komunumo. Por tio estis uzita “fabela” desegnita urbeto, kun pluraj realaj konstruaĵoj de Bjalistoko. Ĉiu konstruaĵo havas sian signifon, ĉiu estas alklakebla kaj oni en ĝi trovas diversajn informojn pri Esperanto: en la lernejo oni povas trovi kurson de Esperanto, en la kinejo oni povas spekti filmetojn pri la lingvo, en gazetkiosko oni povos legi Esperanto-revuojn ktp. Vidu kaj uzu ĝin: <http://kd.ikso.net>

Ni esperas, ke vi fermas sukcesan, bonan jaron kaj ke vi havos eĉ pli sukcesan novan jaron, bonan sanon, feliĉon kaj multe da ĝojo!

Ni informos vin pri novaĵoj, gravaj eventoj rilate al instruado de Esperanto en Germanio, pri lernmaterialoj, instrumetodoj, instrukapabligaj trejnado, ktp. ankaŭ en 2017.

Kun multaj salutoj,



Zsófia Kóródy
AGEI-prezidanto